

60 JAROJ DE ESPERANTISTA KLUBO EN BRNO

Jam antaŭ 50 jaraĵoj estis gvidataj en Brno kursoj de Esperanto, per kiuj bonega helpilo estis lernolibroj kaj vortaroj de tiama fak-instruisto Theodor Ĉejka el Bystřice pod Host., fondinto de la organizita Esperantomovado en la ĉeĥaj landoj. Post konsiderinda strebado kaj celkonsciaj preparoj estis alpaŝite al fondo de Aŭstria Esperantista Societo en Brno, en Laborista Domo, en nuna Marx-strato. Fondintoj de la Societo estis redaktoro Karel Pelant, ĵurnalisto sprita kaj lerta kaj Václav Kovanda, fondinto de kooperativo Včela. Tiama landestro en Brno rifuzis la permeson por fondo de la Societo kaj sian nean starpunkton motivis per tio, ke Esperanto ne estas necesa, kiam ekzistas jam la germana lingvo. Nur interpelacio de deputito V. Hybeš en la Viena parlamento ebligis fondon de la Societo.

Tiel estis fondita la Societo kaj konstituiĝis la unua komitato, kies prezidanto estis K. Pelant, vicprezidanto K. Černík, sekretario V. Kovanda kaj kasisto J. Kajš. Inter pluj komitatanoj estis K. Steier, aŭtoro de postaj germanaj lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto. Ĝi estis la unua esperantista societo sur teritorio de la tiama Aŭstrio-Hungario kaj en ĝi estis ĉeĥoj kaj germanoj. La nova Societo baldaŭ disvolvis abundan aktivecon per aranĝado de prelegoj kaj speciale de kursoj en la urbo kaj antaŭurboj. Ankoraŭ vivas en Brno emerita lernejestro Josef Záboj, unu el gvidantoj de la kursoj. K. Pelant eldonis eminentan broŝuron Ideo de la lingvo Internacia kaj poligloto Frant. Vymazal verkis lernolibron facile kaj rapide. En jaro 1911 solenis la Klubo sian 10 jaran jubileon. Venis esperantistoj el diversaj lokoj de la tiama regno kaj salutleteroj kaj telegramoj el la tuta Eŭropo. Ankaŭ aŭtoro de la Lingvo Internacia D-ro L.L. Zamenhof sendis salutleteron, kiu estis akceptita kun granda entuziasmo.

Post suferoj de la unua mondmilito la homoj sopiris pri la eterna paco kaj tial ankaŭ Esperanto, lingvo de amikeco, vastiĝis kun mirinda rapideco. Estis aranĝataj publikaj kursoj de la Internacia Lingvo kaj Esperanto estis instruata en multaj lernejoj, por fervojistoj, blinduloj k.a. Krom prof. Vincenc Kroužil aperas pluj eminentaj laborantoj Inĝ. J. Sitko, fakinstruisto Jan Šembera, D-ro Josef Barvíř, fakinstruisto Josef Jeřábek, prof. Rudolf Fridrich kaj multaj aliaj. En j. 1921 organizis la Klubo ekskurson al Macocha por 800 membra karavano en kadro de la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, en j. 1922 okazas en Brno la I-a Ĉeĥoslovaka Esperantista Kongreso, kiun partoprenis 300 homoj kaj multaj eksterlandanoj. Konsiderinda estas la eldonagado. Aperas Ĉeĥa Literaturo laŭ Birdperspektivo de Arne Novák en modela traduko de prof. V. Kroužil, Ĉeĥa traduko de la angla broŝuro de T. Gueritte Esperanto, internacia lingvo de inĝenieroj fare de la antaŭa tradukinto, Moravia Karsto de D-ro J. Barvíř kaj de la sama du belegaj folkloraj verkoj Ligado de Tukoj kaj Pilgrimo al la Sankta Antonio. Plue traduko el la franca lingvo fare de Hana kaj Rudolf Fridrich Ligo de Nacioj pri Esperanto kaj gvidlibro tra Brno de J. Šembera.

En 1927 okazas la unua perradia kurso de Esperanto, kiun gvidis prof. Josef Bednář per tiom interesa maniero, ke la sukceso estis vere sensacia. Kun prof. J. Bednář, aŭtoro de bonega lernolibro kaj libro de gajaj rakontoj Barono Mensogbabilulo, venas modernaj propagandaj metodoj.

La Ekspozicion de l' Nuntempa Kulturo en Brno en j. 1928 propagandis la Klubo el ĉiuj fortoj kaj prospekton en Esperanto pri ĝi dissendis en pluraj miloj en la tutan mondon. Jaron poste akceptas la Klubo 300 membran karavanon revenanta el UK en Budapeŝto. In tiu tempo dum kelke da jaroj aperas en Nový lid (La Nova Popolo), la plej disvastigita etika gazeto iniciato de dir. Ota Petr kaj per laboro de la Klubo ampleksa regula informado pri la Lingvo Internacia. O. Petr verkis bonegan vortaron Esperantan-ĉeĥan.

Al la kreskanta kluba vivo ne plu sufiĉis lerneja klaso kaj tial estis trovita nova klubejo en hotelo Passage (nuna Slovan), kio por tri jardekoj altgrade konvenis al bezonoj kulturaj kaj societaj. En Radio-stacio de Brno havis Esperanto, dank' al neforgesebla ĝia direktoro, Inĝ. Antonín Slavík, ekzekutita en Berlino 1942 de nazioj, firman lokon. Prelegoj informas la mondon pri nia ŝtato kaj popolo, ĝia vivo kaj arto. Estis disaŭdigataj kompletaj dramverkoj, operoj, operetoj, kabaredoj, horetoj. Rolis la plej eminentaj aktoroj de la Landa Teatro. Tial la Radio-Stacio de Brno "Verda Stacio" estis plenrajte la plej populara inter esperantistoj de la tuta mondo. Meritoj apartenas ankaŭ al J. Šamla, M. Strejčková, kaj ĉefe al reĝisoro Dalibor Chalupa kaj prof. Theodor Kilian el Třebíč.

En j. 1935 okazis en Brno la VI-a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso kun 206 partoprenintoj. Ankaŭ ĝi bene sukcesis, venis salutleteroj ol diversaj ministerioj kaj multaj organizaĵoj. Kaj brila artvespero. En j. 1917 okazis unu el la plej memorindaj literaturaj vesperoj, kiun partoprenis grandnombre esperantistaro el Brno kaj ĉirkaŭaĵo. Nome venis sepmembra grupo de eminentaj esp. poetoj kaj verkistoj, inter ili D-ro Kolomano Kalocsay. En la krizaj jaroj 1937 kaj 1938 la Klubo informandis la mondon pri la vera stato de la aferoj, rilatis kun la Londona Esperantista Klubo, sendadis al ĝi artikolojn, kiuj ne unufoje aperis kiel ĉefartikoloj en la Londonaj ĵurnaloj kaj estis eĉ legitaj en tiea urbeŝtaro laŭ Informo de s-ano B. Chipperfield. Post la tragikaj okazaĵoj oktobraj la agado de la Klubo moderiĝis, sed ne ĉesis. Venis plua plago - la okupacio. Okazis enketado ĉe gestapo, domtraserĉoj kaj fine estis ordonita, sub la plej severaj reprezalioj, likvido de la Klubo. Ĝi okazis en junio 1940, sed ĝi estis formala, la klubanoj plu kunvenadis ĝis militstato en 1941. Post ses jaroj de la terura milito, kiu detruis dekmilionojn da homoj kaj senfinajn valorojn ni ĝisvivis grandparte tempon de la paco kaj libereco. Neniam ni forgesos la Ruĝan kaj ĉeĥoslovakajn armeojn, kiuj batalis por liberigo de nia patrio. Post la liberigo estis objektivaj esplorataj la ŝancoj por ekzistado de la Klubo, eblecoj de laboro por Esperanto kaj pere de ĝi por bono de nia nacio, kaj estis decidite renovigi la agaden. Kun la malnovaj laborantoj aperas novaj: Josef Friedrich, grava funkciulo de iama Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovakio, veninta en Brnon 1939, prof. Vilibald Scheiber, Dr. Jan Geryk, Jiří Kořínek k.a. Kaj sekvis kursoj publikaj kaj lernejoj, afiŝado, flugfolioj, gazetanoncoj, reklamo en multaj kinoj, libro-ekspozicioj, prelegoj de eminentaj eksterlandaj esperantistoj (A. Alamo, D-ro A. Buhr k.a.) aranĝo de koncertoj al Nuni Nanev el Sofio, M. Santruil el Parizo, partopreno en la tutŝtata Filatela Ekspozicio, partopreno en la ekspozicio Verko de Petr Bezruč, ĉiusemajnaj kulturaj programoj estis firme fiksitaj kaj presataj, estis akceptataj gesamideanoj el la tuta mondo, okazis akcepto de karavanoj el Danlando, Nederlando, Svislando. Glora entrepreno estis la VIII-a ĉs. Esperanto-Kongreso en 1950, al kiu aliĝis 997 esperantistoj, sed partoprenis 1.100 el ĉiuj regionoj de la respubliko. Kulturaj aranĝoj estis vere grandiozaj

sub programestro prof. V. Scheiber. Danko apartenas ankaŭ al liverintoj de brilaj tradukoj de operarioj kaj koncertmelodioj J. Kořínek kaj el la ceteraj lokoj Rudolf Hromada, D-ro Tomáš Pumpr, prof. Miloš Lukáš k.a. En leteroj akceptitaj kaj forsenditaj estas multaj dekmiloj, multobligita Bulteno por informado de la membroj aperas jam 10 jarojn, estis aranĝita granda kaj belarta ekspozicio "70 Jaroj de Esperanto" en haloj de la Industria Muzeo, estis dissenditaj miloj da Foiraj Bultenoj por servi al la Internacia Foiro de Brno, aparte menciindaj estas teatraj vesperoj sub reĝisorado de Marie Adamcová kaj junularaj vesperoj sub gvido de Marta Lorková, neforgesebla estas la tago, kiam ni akceptis hungaran delegacion, kiu estis Julio Baghy kaj Bajos Marton.

De la jaro 1951 apartenas la Klubo sub Klerigan Kunularon J. A. Komenský, posta Kleriga Domo, nuna Parko de Kulturo kaj Ripozo, kie ni renkontiĝas kun plena kompreno, subteno kaj komplezo, tiom necesa por plua sukcesa agado.

Dum la tuta tempo la Klubo daŭrigis en laboroj kulturaj kaj klerigaj, krom memkompreneblaj penadoj pri perfekta scio de la internacia Lingvo. Dum tiu tempo la Klubo sukcese plenumadis sian mision. Ankaŭ la literatura parto ne estas neglektata. Ekzistas dekoj da manuskriptoj (opero Jakobeno, Apokrifoj de K. Čapek, rakontoj el la dua Poŝo de la sama aŭtoro, Bestetoj de K. Rais, Manon Lescaut de V. Nezval, teatraĵo Ondro kaj Drako de V. Dyk, Paĉjo de j. Seifert, humora romano Saturnin de Jirotko k.a.), por kiuj ne ekzistas eldoneblo. Ĉe sia laciga kaj respondeca laboro ĉiam trovis klubanoj iom da tempo por labori kaj partopreni gravajn kulturajn kaj societajn eventojn, kiuj prosperigis kiel la movadon tiel la publikan vivon entute.

Esperantista Klubo en Brno restu fidela al sia elprovita tradicio kaj neniam laciĝu en la laboro per afero bona kaj marŝu al pluj sukcesoj.

Josef V o n d r o u š e k.

=====

46. světový esperantský sjezd, který se konal v anglickém městě květin a parků Harrogate koncem července t.r., byl opět velmi úspěšný. Zahájení, jehož se zúčastnilo přes 2,000 esperantistů (přihlášeno jich byla 1.700 z 35 zemí), byla v královském divadle, kde účastníci sjezdu byli přijati a pohoštění starostou města Frankem Alkumem. Zastoupena byla vláda Belgie, Německé spolkové republiky, Maďarska, Iranu, Jugoslávie, Holandska, Norska, Švédsko a Anglie. Také rozhlasová stanice Varšava a Zagreb vyslaly své zástupce. Předsedou sjezdu byl slavný japonský učenec, místopředseda UEA profesor Dr Hidae Yagi, slavnostním řečníkem Prof. Ivo Lapenna, jemuž byly po jeho projevu uspořádány velké ovace. Nejcharakterističtější známkou sjezdu byl valmi úspěšný I. mezinárodní umělecký festival, sestávající z divadelních představení, sborových koncertů, národopisného večera a j., nezapomenutelný byl večer jugoslávského tanečního a folkloristického souboru "Branko Cvetkovič" z Bělehradu. Dále byly na pořadu přednášky na Mezinárodní letní universitě, soutěž literární, řečnická, fotografická a j. Hlavním tématem sjezdu byla otázka Východ-Západ, výměna kulturních hodnot a školská kampaň. Státy, kde je připravena půda pro zavedení esperanta do škol, jsou kromě Polska a Jugoslávie také Brazílie, Švédsko, Finsko, Dánsko, Nový Zeeland, Island a j. Zástupce polské vlády navštíví v té věci odpovědné činitele v lidové demokratických zemích. V rámci sjezdu se konaly schůze Mez. vědeckého svazu esperantistů, právníků, lékařů, učitelů, architektů a stavitelů, zeměpisné společnosti, obránců míru, katolického svazu, křesťanského, budhistického, železničářů, Světového studentského svazu a p. Příští 47. světový esperantský sjezd bude v

Kodani ve dnech 4.-11. 1952.

=====

Ve Varšavě byla pojmenována nová škola jménem autora esperanta Dr. L.L. Zamenhofa. Na škole je umístěna mramorová tabule s nápisy. Pojmenování školy bylo spojeno se slavnostní akademií.

=====

Australská vláda připravila další zvukový film v esperantu pod názvem Taková je Austrálie.

=====

Světověznámá firma Phillips, která má v 60 zemích své pobočky a v jejichž službách pracuje 245.000 zaměstnanců, vydá v esperantu katalog lékařských přístrojů. Příklad této firmy jistě přiměje k následování další podniky na světě.

=====

Podle nově schváleného učebního plánu v Dánsku se stalo esperanto nepovinným předmětem v 8. a 9. ročníku všech škol a na večerních školách. Na pozvání dánského ministerstva školství vykonal prof. dr. I. Lapenna okružní přednáškovou cestu, na které mluvil o jazykové otázce v mezinárodních stycích a o řešení, které skýtá esperanto.

=====

Značné peněžité subvence dostaly za svou činnost kluby v Zagrebu, na Sicilii, v Brazílii a v Argentině.

=====

V hlavním městě Nepalu se pořádá několik kursů esperanta. Vedoucí těchto kursů byl představen nepálskému králi Mahendrovi při příležitosti jeho narozenin a za přítomnosti celé vlády podal zprávu o své činnosti pro esperanto.

=====

Sledujte naše pořady a účastněte se jich pravidelně.

Předkládáme platenky těm, kteří ještě letos nepoukázali svůj příspěvek. Těšíme se, že tak učiníte nyní a děkujeme.